

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Ĉe la 100-a UK en Lillo

Entute 16 membroj el nia rondo partoprenis en la 100-a Universala Kongreso en Lillo, Francio (25a julio - 1a aŭgusto). Okaze de la Movada Foiro en la 25a, ĉe la budo de Japana Esperanto-Instituto, ankaŭ nia rondo disdonis la 300-an n-ron de nia esperantlingva organo "Novaĵoj Tamtamas" al ĉ. 30 vizitintoj. Utiligante tiun ĉi kongreson, ni donacis 30 ekzemplerojn de nia kursolibro "Hanako lernas

Esperanton" por afrikaj movadanoj, pere de s-ino Mirejo Groĵan. En la Fermo, s-ino Doi Ĉieko ricevis de UEA "Diplomon de elstara agado", pro tio ke ŝi longtempe redaktadis la organon "Esperanto en Azio", laŭ UEA.

Dume, en la 25a de julio en Jokohamo, ne okazis regulaj kunsidoj, sed okazis speciala konversacia klaso de Wajik Iwanicki, al kiu venis 2 membroj niaj. (Sibayama Zyun'iti)

**Gratula letero de  
Tatyana Auderskaya  
el Ukrainio**

Karega Ĉieko!

Hodiaŭ mi eksciis, ke vi estas honorigita per diplomo pro elstara Esperanto-agado. Bv akcepti miajn plej korajn gratulojn. Mi tre ĝojas, ke via laboro estas agnoskita sur la plej alta nivelo.

deziras al vi pluajn sukcesojn, en Esperanto kaj en la vivo; feliĉon, sanon, ĝojon.

Amike via,

Tanjo

## Faka prelego de s-ino Heidi Goes

aŭgusto 30, 14h30-16h30, ĉe Tikyuu-Plaza (Tergloba Placo)

Belga lingvisto-esperantisto, s-ino Heidi Goes [huŝ], okaze de sia vizito al Japanio, havis prelegon antaŭ 21 samideanoj, kun interpreto en la japanan fare de Sibayama Zyun'iti. La temo estis pri la fonologio de afrikaj lingvoj, kiel vi legas en la apuda bildo. Ĝi estas unu el la temoj por doktoriĝa kurso en la projekto nomata Kongoking, por prilumi la iaman Reĝlandon Kongo en la mezo de Afriko. La samtaman prelegon ŝi faris anglalingve en Kioto, kaj ŝi esperantigis ĝin. Kvankam ŝi vizitis kelkajn esperantistojn dum sia vojaĝo, tia prelego estis nur ĉe ni. Ŝi estas konata inter esperantistoj, kiel disvastiganto de Esperanto en Indonezio kaj Orienta Timoro.



Kvanteca kaj spaca analizaj studoj de mikro-variado en la konga lingvaro

### Historia fonologia aliro

Heidi Goes, Gilles-Maurice de Schryver & Koen Bostoen  
Yokohama – 30a de aŭgusto 2015

[www.kongoking.org](http://www.kongoking.org)

# 100 FOJOJN DA LEGOKUNSIDO

En nia rondo, ni havas legokunsidon, lastatemp 4 fojojn jare. Tiu kutimo komenciĝis en 1990. Oni anticipe legas libron asignitan, kaj en la kunsido partoprenantoj preparolas impreson pri la libro. Poste aperas tiu impreson en nia organo "La Tamtamo" (por japanlingvaĵo) aŭ "Novaĵoj Tamtamas" por esperantaĵo. Jen ni prezentas la liston de la 100 verkoj. Iuj estas originale esperantaj, aliaj estas tradukaĵoj. Iuj estas fikcioj, aliaj estas nefikcioj. Iuj estas de japana aŭtoro aŭ kompilanto, aliaj estas de alilandaj esperantistoj.

## Listo de la legokunsidoj de Jokohama Esperanto-Rondo

- 1987-09-06 Oni fondis "legoklubon" kaj legis "Kalevala"; 7 venis.
- 1987-11-29 "Maja pluvo" (Julian Modest); 3 venis.
- Legokunsido komenciĝis en 1990. Lastatemp oni kunvenas principe ĉiun sezonon. Krom la registritaj "venintoj", foje iuj partoprenis, prezentante "skribon de impresoj".
- 1-a: 1990-09-21 "Ne senditaj leteroj el Japanio" (Spomenka Štimec); 4 venis.
- 2-a: 1990-11-16 "Japanaj vintraj fabeloj" (Miyamoto Masao); 4 venis.
- 3-a: 1991-01-18 "Patroj kaj filoj" (Ivan Turgenjev /trad. K.Bein (Kabe); 5 venis.
- 4-a: 1991-03-15 "La bona lingvo" (Claude Piron); 4 venis.
- 5-a: 1991-05-17 "Lasu min paroli plu" (Claude Piron)
- xxx: 1991-09-28 (Ne okazis, sen sufiĉaj venintoj)
- 6-a: 1991-11-30 "La unua kursolibro" (Sakamoto Syozi)
- 7-a: 1992-03-14 "Verda koro" (Julio Baghy); 4 venis.
- 8-a: 1992-05-23 "Karlo" (Edmond Privat); 4 venis.
- 9-a: 1992-09-19 "Joĉjo"; 3 venis.
- 10-a: 1993-02-13 "Vizito de prezidento" (Jerzy Zawieyski); 6 venis.
- 11-a: 1993-04-10 "La fratoj Leonkoro" (Astrid Lindgren /trad. Kerstin Rohdin); 5 venis.
- 12-a: 1993-07-10 "La kormoranoj ankoraŭ ne revenis." (Mandor Gion /trad. L.Huszar)
- 13-a: 1993-10-09 "Dum vi estis kun ni" (Istvan Nemere); 4 venis.
- 14-a: 1994-01-22 "Kumeŭaŭa" (Tibor Sekelj); 3 venis.
- 15-a: 1994-04-16 "Emilo de Smolando" (Astrid Lindgren /trad. H.brown K. Rohdin); 8 venis.
- 16-a: 1994-07-09 "Sub influo de alkoholo" (J. Herbert Sullivan); 6 venis.
- 17-a: 1994-10-08 "Homoj sur la tero" (Stellan Engholm); 6 venis.
- 18-a: 1995-01-07 "Mi malamas..." (Hajasi Ken)
- 19-a: 1995-04-08 "Patrino koro" (Nevena Nedelĉeva); 8 venis.
- 20-a: 1995-07-08 "Muminvalo" (Tove Jansson / trad.: E.Bick); 6 venis.
- 21-a: 1995-11-25 "La Eta Princo" (Saint-Exupery /trad.: E.Lapenna); 4 venis.
- 22-a: 1996-03-30 "Mazi en Gondolando" (Roman Dobrzyński, k.a.)
- 23-a: 1996-06-29 "La fremdulo" (Albert Camus /trad.: M.Duc Goninaz); 7 venis.
- 24-a: 1996-09-28 "La profeto" (Kahil Gibran); 6 venis.
- 25-a: 1996-12-14 "Viktimoj" (Julio Baghy); 3 venis.
- 26-a: 1997-03-08 "Sur Sanga Tero" (Julio Baghy); 6 venis.
- 27-a: 1997-06-14 "Kanakano el Kananam" (Kenneth G. Linton); 6 venis.
- 28-a: 1997-09-13 "Nesto de Viperoj" (Istvan Nemere); 7 venis.
- 29-a: 1997-12-06 "Buŝo plena je tero" (Branimir Ŝĉepanović); 5 venis.
- 30-a: 1998-03-07 "Ĉu vi kuiras ĉine?" (Johan Valano); 5 venis.
- 31-a: 1998-06-13 "Amparolo" (Istvan Nemere); 6 venis.
- 32-a: 1998-09-19 "Inter tero kaj ĉielo" (Benjamin Jacobsen /trad.: S. Johansson); 7 venis.
- 33-a: 1998-12-05 "La oldulo kaj la maro" (Ernest Hemingway /trad.: Fernand de Diego)
- 34-a: 1999-04-03 "Ivan la malsaĝulo" (Lev

- Tolstoy / trad.: V.A. Ŝrikov); 7 venis.
- 35-a: 1999-06-08 "Sep vangofrapoj" (Karoly Aszlanyi); 7 venis.
- 36-a: 1999-09-04 "Verdaj Donkiĥotoj" (Julio Baghy); 7 venis.
- 37-a: 1999-12-04 "Aventuroj en Esperantujo" (Ralph Harry); 6 venis.
- 38-a: 2000-04-01 "Kie boacoj vagadas" (Eija Salovaara)
- 39-a: 2000-06-03 "La vidvino kaj profesoro" (Ronald Cecil Gates); 5 venis.
- 40-a: 2000-09-09 "Falantaj muroj" (Trevor Steele); 6 venis.
- 41-a: 2000-12-02 "Taglibro de Anne Frank" (trad.: Nora Bartels); 5 venis.
- 42-a: 2001-03-03 "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapiĉ" ( I. Brlić-Mažranić / trad.: Maja Tišljarić); 4 venis.
- 43-a: 2001-06-02 "Tena: Hejmo en Mezeŭropo" (Spomenka Ŝtimec); 6 venis.
- 44-a: 2001-09-08 "Tien" (Johan Valano); 4 venis.
- 45-a: 2001-12-01 "La fermita urbo" (Istvan Nemere); 6 venis.
- 46-a: 2002-03-02 "De vilaĝo al ĉefurbo" (Gbeglo Koffi); 9 venis.
- 47-a: 2002-06-01 "Kio ni estas kaj kion ni celas" (M. Fettes, R. Corsetti k.a.); 11 venis.
- 48-a: 2002-09-07 "Vole.....Novele" (Raymond Schwartz); 8 venis.
- 49-a: 2002-12-07 "Marta" (Eliza Orzeszko/ trad.: Zamenhof); 3 venis.
- 50-a: 2003-03-01 "Kuniberto kaj Kilevamba" (Gudrun Paŭsewang); 6 venis.
- 51-a: 2003-06-07 "Krias la silento" (Istvan Nemere); 8 venis.
- 52-a: 2003-09-06 "Sarkasme kaj entuziasme" (Miyamoto Masao); 6 venis.
- 53-a: 2003-12-06 "La Bato" (Lena Karpunina); 7 venis.
- 54-a: 2004-03-06 "Rakontoj ne nur ŝercaj" (Vladimir Vana); 6 venis.
- 55-a: 2004-06-05 "Paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof" (kompilis T. Kawaniŝi, Y. Mine ); 5 venis.
- 56-a: 2004-09-04 "Memori kaj forgesi" (Trevor Steele); 5 venis.
- 57-a: 2004-12-04 "Tilla" (Spomenka Ŝtimec); 4 venis.
- 58-a: 2005-04-09 "Vivbruligita" (Suad); 4 venis.
- 59-a: 2005-06-11 "Katrina malfruas" (Sten Johanssen); 6 venis.
- 60-a: 2005-09-10 "Epitomo de Esperantologio" (N. Gudskov); 6 venis.
- 61-a: 2005-12-10 "Hundo de Flandrio" (Ouida/ trad.: Lode Van de Velde ); 8 venis.
- 62-a: 2006-04-08 "Hispana, Kataluna, Mangada..." (Dil Avia); 8 venis.
- 63-a: 2006-06-10 "Serĉu, kaj vi trovos" (Istvan Nemere); 6 venis.
- 64-a: 2006-09-09 "Historio de Esperanto" (Aleksander Korĵenkov)
- 65-a: 2006-12-09 "Ĉielarka estonto" (Carmel Mallia); 7 venis.
- 66-a: 2007-03-10 "Historio de Esperanto" (Aleksander Korĵenkov); 6 venis.
- 67-a: 2007-06-09 "Historio de Esperanto" (Aleksander Korĵenkov); 5 venis.
- 68-a: 2007-09-08 "La Aĵoj kaj Sezonoj" (Ulrich Becker); 5 venis.
- 69-a: 2007-12-08 "Diverskolore" (Trevor Steele); 5 venis.
- 70-a: 2008-03-08 "Diverskolore" (Trevor Steele); 2 venis.
- 71-a: 2008-06-21 "Al Trento" (Stellan Engholm); 4 venis.
- 72-a: 2008-09-13 "Kuniberto kaj Kilevamba" (Gudrun Pausewang); 6 venis.
- 73-a: 2008-12-13 "La Edzino de Kuracisto Hanaoka Seisyū" (Ariyosi Sawako/ trad.: Konisi Gaku); 6 venis.
- 74-a: 2009-03-14 "Japana Eŝearo" N-ro 4 (kompilis Libroteko Tokio); 5 venis.
- 75-a: 2009-06-13 "La Tundro Ĝemas" (Vasilij Eroŝenko); 8 venis.
- 76-a: 2009-09-12 "Utila estas Aliĝo" (Ulrich Lins); 6 venis.
- 77-a: 2010-01-09 "Neokazinta Amo" (Lena Karpunina)
- 78-a: 2010-03-13 Nova Zamenhofa Legolibro (Kompilita de Kawanisi Teturo); 7 venis.
- 79-a: 2010-06-12 "Mi amas ..." (Ueyama Masao); 7 venis.
- 80-a: 2010-09-11 "Tiel okazis aŭ Mistero Mimora" (Ferenc Szilagy); 4 venis.
- 81-a: 2010-12-04 "Silento" (Endoo Ŝuusaku, trad.: Doi Ĉieko); 8 venis.
- 82-a: 2011-03-19 "Ruĝa kokono" (Abe Kobo, trad.: Hayasi Ken); Ne okazis pro la tertremo okazinta en 03-11. 2 skriboj venis.
- 83-a: 2011-06-11 "Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi" (Hans Ulrich); 4 venis.
- 84-a: 2011-09-10 "Falĉita kiel fojno" (Sten

- Johansson); 7 venis.  
 85-a: 2011-12-03 "Elektitaj paroladoj kaj prelegoj" (Ivo Lapenna)(ĝis p.70); 4 venis.  
 86-a: 2012-03-03 "Trans maro kaj morto" (Sten Johansson); 6 venis.  
 87-a: 2012-06-09 "Flugi kun kakatuoĵ" (Trevor Steele); 5 venis.  
 88-a: 2012-09-08 "Lee Chong-Yeong gvidanto nia"; 5 venis.  
 89-a: 2012-12-01 "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo" (Tibor Sekelĵ); 8 venis.  
 90-a: 2013-03-02 "Viktimoĵ" (Julio Baghy); 8 venis.  
 91-a: 2013-06-01 "Nesenditaj leteroj el Japanio" (Spomenka Ŝtimec); 5 venis.  
 92-a: 2013-09-14 "Sur Sanga Tero" (Julio Baghy); 6 venis.  
 93-a: 2013-12-07 "Punkuino kaj aliaj nepalaj rakontoĵ" (kompilis kaj tradukis Razen Manandhar); 8 venis.  
 94-a: 2014-03-01 "Poemoĵ de Armand Su" (Armand Su); 5 venis.  
 95-a: 2014-06-07 "Rakonto de Ovoj" (J. Marc Schmidt); 4 venis.  
 96-a: 2014-09-13 "Krokize de mia ĝardeno" (István Nemere); 5 venis.  
 97-a: 2014-12-13 "Pri homoj kaj verkoĵ" (diversaj aŭtoroj); 5 venis.  
 98-a: 2015-03-14 "Lumo kaj Ombro" (V. Eroŝenko); 6 venis.  
 99-a: 2015-06-06 "Modernaj Robinzonoĵ" (T. Schwartz); 6 venis.  
 100-a: 2015-09-12 [okazonta] "Padma, la dancistino"(Tibor Sekelĵ)



## Letero de Adjévi el Togolando

Tre karaj,

La poŝtoŝejo alportis al mi la numeron 305 de via periodaĵo "Novaĵoj Tamtamas". Kun intereso kaj dankemo mi tralegis ĝin de A ĝis Z.

Vi faras tre belan laboron kaj mi gratulas vin ĉiujn. Mi esperas, ke estontece ni pli kaj pli sukcesos reciproke interŝanĝi niajn revuojn (miavice mi aldonas la revuon preparatan de ni en Togolando). Esti esperantisto signifas ankaŭ tion.

Refoje dankon al vi.

Amike,

Adjévi



## NIAJ PLANOJ

- \*La 100-a legokunsido, pri "Padma, la eta dancistino" de Tibor Sekelĵ sept. 12, 13h00-15h00, ĉambro 707 de Kanagaŭa-Kenmin Sentaa
- \*Aŭtuna rudimenta kurso de Esperanto de sept. 26 ĝis dec. 12, 15h00-17h00, en iu ĉambro de Kanagaŭa-Kenmin Sentaa
- \*Ekspozicio ĉe Internacia Festivalo de Jokohamo 2015 okt. 10, 11, en la Parko Zoo-no-hana en la haveno de Jokohamo Ni aranĝos ekspozicion en tendoo. Ĉi-jare, samtage ni havos alian okazaĵon (sube notitan), sed niaj membroj dividos rolon.
- \*La 102-a Japana Esperanto-Kongreso okt. 10, 11, 12 en la urbo Sendai. Nia rondo tenos standon.

## Niaj Klasoj kaj Kursoj

- En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa, okazas jenaj klasoj.
- \*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Klaso por legado de "Hispana, Kataluna, Mangada..." / (2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: "Vizaĝoj"
  - \*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni legas "La Zamenhof-Strato" de Roman Dobrzyński. / (2) Daŭriga kurso; legata libro estas "Karlo".